

Oomoto

1
9
7
2

Maj.-Jun.

Japana ĵurnalismo atentas pri la ekspozicio “LA ARTO DE ONISABURO kaj de lia skolo”

Rilate la ekspozicion “La arto de Onisaburo kaj de lia skolo” okazonta en Parizo, ĉi-aŭtune, pri kiu ni jam publikigis en la lasta numero, la japana ĵurnalismo montras grandan intereson kaj jam pluraj tagĵurnaloj kaj semajngazetoj publikigis favorajn artikolojn. Aliflanke, ĉe la Oomoto-centro la preparlaboroj bone progresas. Oni jam selektis la ekspoziciotajn verkojn de Onisaburo, Sumiko, Naohi, Hidemaru kaj Naomi, tiel ke ili estos transsenditaj al Parizo en septembro. Kunlige kun la ekspozicio, oni projektas diversajn publikajn prezentojn, ekz. de ĉanoja prezento, prelegkunveno, japana vespero, k. s., por kiuj niaj legantoj kaj multaj esperantistoj en Eŭropo estas petataj subteni per persona ĉesto kaj kunlaboro. Pri la detaloj ni povos publikigi en la venonta numero.

Jen estas la ekstrakto de la artikolo pri la ekspozicio aperinta en

“*Mainiĉi Ŝinbun*”, unu el la plej gravaj tagĵurnaloj japanaj, la 28-an de feb. 1972.

“La unua eksterlanda ekspozicio de la artverkoj de Onisaburo Deguĉi, kunfondinto de religia organizaĵo Oomoto, okazos de la 18-a de okt. ĝis la 17-a de dec. ĉi-jare ĉe Muzeo Cernuschi en Parizo. Onisaburo alvokis la ‘unuiĝon de religio, arto kaj vivo’, kaj postlasis multajn majstroverkojn de kaligrafio, pentroarto kaj potaĵoj.

“S-ro Vadime Elisseeff, kuratoro de la muzeo, volonte prirespondecis la ekspozicion ‘La Arto de Onisaburo kaj de lia skolo’ sub aŭspicioj de la urbo Parizo.

“La kuratoro estas aŭtoritatulo pri Orientaj artoj kaj estas konate, ke lia patro estis unu el tiuj kiuj klopodis savi la urbon Kioto de bombardado dum la dua mondomilito. Tiuj du generacioj, patro kaj filo, estas

Oomoto

47-a jaro

n-ro maj.-jun.
(383-384), 1972

monata organo de Oomoto kaj Univerŝala Homama Asocio (eldono: dumonata)

Fondita en 1925

Redaktoro: T. Nakamura

Administracio (por alŝendo de abonkotizo, manuskriptoj, informoj, k.s.):

OOMOTO, Kameoka,
Kioto-hu, 621 Japanujo.

Telefono: Kameoka (2) 5561.

Poŝta ĝirkonto: Kioto 25637 (Oomoto).

Presisto: Tensei-ŝa, Kameoka

Jara abono (1971): 24 steloj (1.70 usona dol.; 6.00 ned. gld.)

Reprezentantoj de Oomoto, ĉe kiuj estas pagebla la abonkotizo, troviĝas en 24 landoj.

Pagebla ankaŭ rekte al la administracio de Oomoto, aŭ al Univerŝala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam -2, Nederlando.


Cirkulas en ĉ. 80 landoj.

AVIZO


Japandevenaj vortoj, kiujn ni de temp' al tempo uzas sen glosoj en ĉi tiu revuo, estas troveblaj en EJ (= *Enciklopedieto Japana*).

studentoj pri la japana kulturo. La kuratoro venis al Japanujo lastan jaron, vizitis la Oomoto-centron kaj aranĝis la entreprenon.


“Estos ekspoziciotaj ĉ. 160 verkoj, multaj el kiuj ankoraŭ ne aperis antaŭ la publiko ĝis nun. El inter 3,000 te-bovloj faritaj de Onisaburo dum liaj lastas jaroj, ĉ. 60 majstroverkoj, kiel *Paradizo n-ro 28* kaj *Freŝa palisaro* iros al Parizo. Pentraĵoj kaj kaligrafiaĵoj sur grandformataj biomboj kaj paneloj ankaŭ veturos al Eŭropo. Precipe allogos la vizitantojn tiuj mane-kneditaj te-bovloj, kiuj kreas unikan mondon de potaĵo, kiel art-kritikistoj laŭdas ilin komparante kun la mondo de Picasso. ‘La ekspozicio certe altiros pli novan atenton inter artamantoj en Eŭropo ol iu ajn ekspozicio pri japanaj artverkoj ĝis nun okazinta tie ĉi’, kura toro Elisseeff tiel certigas la sukceson.” (J. U.)



Hidemaru:
Bambuo en pluvo



***Naohi*: Miskanto**



***Hidemaru*: Monto kaj rivero**

La Fundamento de Esperanto

Estas certe refreŝige legi de tempo al tempo vortojn de nepra fideleco al la Fundamento, kiel tiujn de D-ro A. Halbedl sub la titolo "For la Ĥaason!" (Nov./Dec. 1971 de "Oomoto"). Efektive, nur la Fundamento povis doni konstantecon al nia lingvo dum ĝia pli ol 80-jara ekzisto.

Tamen necesas interpreti la Fundamenton tiel, kiel D-ro Zamenhof mem klare tion faris en la Fundamenta Antaŭparolo, formanta parton de la fundamento mem :

"... Malgraŭ la severa netuŝebleco de la fundamento, nia lingvo havos la plenan eblon ne sole konstante *pliboniĝadi* kaj *perfektiĝadi*...

"... 1) *Riĉiĝadi* la lingvon per novaj vortoj oni povas jam *nun*, ... sed tiuj ĉi vortoj devas esti nur *rekomendataj* (mia substreko, la aliaj estis substrekoj en la originalo), ne altrudataj; oni devas ilin uzadi nur en la *literaturo*...

"... 3. ĝis la tempo kiam aŭtoritata centra institucio decidus *pligrandigi* (neniam *ŝanĝi!*) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj, ĉio bona, kio ne troviĝas en la "Fundamento de Esperanto", devas esti rigardata ne kiel deviga, sed nur kiel *rekomendata*."

15-a regulo de la Fundamenta Gramatiko (en Esperanta traduko. La Fundamenta Gramatiko aperis origine en 5 naciaj lingvoj, ne en Esperanto):

La tiel nomataj vortoj "fremdaj", t. e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvo prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo internacia sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo; ...

Laŭ tiuj klarvidaj Fundamentaj preskriboj la landnomoj finiĝantaj en *-io* povas esti uzataj 1e) ne kiel devigaj, sed kiel *rekomendataj*, 2e) kiel internaciaj vortoj, kiaj ili ja efektive grandparte estas (alprenante la Esperantan substantiv- aŭ adjektivfinaĵon: ekz. Aŭstrio, Aŭstria lando). Precipe internacia estas *Aaŭstrio* el la latina formo *Austria*, kiun transpre-

nis la angla, la hispana, la portugala, itala, hungara, rusa (Avstrija) ktp. lingvoj kaj eĉ en Aŭstrio mem oni povas ofte legi la vorton "Austria" kiel nomon de firmoj, hoteloj, pensioj ktp. — Ankaŭ la vorto Aŭstrujo estas nenio alia ol iom arbitra ŝanĝo de la latina Austria. Tamen, eĉ se estas vero, ke Zamenhof mem uzis la formon Aŭstrujo, en la latina ne ekzistas "aŭstroj". La aŭstrianoj mem sin nomas "Österreicher" (orientregnanoj)! Nenie en la Fundamento ni trovas la vorton *aŭstro*!

Kial la ortografio *Jesuo, Jerusalemo, Israelo* estus atenco kontraŭ la Fundamento, tion mi ne komprenas. Se iu tiel skribas ilin, prononcante tamen Jesuo ktp., oni povas lin ja riproĉi, same se multaj aŭstrianoj (aŭ aŭstroj) prononcas ĉui anstataŭ ĝui kaj ĉojo anstataŭ ĝojo, sed temas pri nelerteco, ne pri atenco kontraŭ la Fundamento. Mi certigas al d-ro Halbedl, ke ĉiu hispanlingvulo (same kiel ni legis tion pri japanoj) bone prononcas la sonon "s" (sed ofte malbone la sonon "z" ĉe hispanlingvuloj).

Novajn vortojn en Esperanto oni povas krei per tri metodoj, nome: 1e) kunmeto laŭ la reguloj de la Esperanta gramatiko, 2e) internaciaj vortoj laŭ § 15 de la Fundamento, 3e) pruntvortoj el naciaj lingvoj. Kontraŭ la tria metodo multaj konservativaj esperantistoj protestas, kvankam estas ja evidenta, ke tiaj vortoj nur enhejmiĝas, se multaj personoj ekuzas ilin, kio estas pruvo de efektiva bezono. Ŝajnas al mi misgvida nomi nur la vortojn laŭ metodo 3a) "neologismoj". Neologismo estas ja ĉiu vorto nova, ĉu nova kunmeto, ĉu nova pruntvorto. Se ekz. d-ro Halbedl uzas la vorton "postsilabo" anstataŭ la kutima kaj Fundamenta *sufikso* (vidu Ekzercaro paragrafojn 30 kaj 42), li provas enkonduki neologismon kaj eĉ ne tute logike formitan, ĉar "postsilabo" pli taŭgas — miaopinie — por la finaĵoj -o, -a, -e, -i ktp.

Tamen mi volonte akceptas ankaŭ "postsilabon" apud sufikso. Ni devas esti toleremaj unu al la alia. Nur per toleremo kaj konkordo floros Esperanto. Se ni kverelas eĉ pro formoj tiel malgravaj kiel Aŭstrio aŭ Aŭstrujo kaj kondamnas pro tio la plej valoran parton de nia literaturo (ekz. tiun de Kalocsay), ni ne meritas la nomon "pacaj batalantoj". Ĉu vere Kalocsay verkis en Esperanto nur por akiri "famon"? Tia rimarko ŝajnas al mi tre nejusta! Mi en tio povas vidi nur elgliton de tro hasta plumo. Kaj se prof. Lapenna eble evitas uzi en siaj kongresaj festparoladoj la ujo-formojn, do li certe ne faras tion por ŝoki iun konservativan samideanon, sed konjekteble ĉar ĉeestas ĉe la solenaj malfermoj de la kongresoj ŝtataj reprezentantoj, kiuj avidas kompreni iom el la parolado de la ĉefa aŭtoro.

For la **Ĥ**aosvidantojn!

Tutrespekte rilate la gravan kaj estimindan personecon de D-ro Halbedl, mi volas — kiel simpla esperantisto jam de pli ol kvardek jaroj — esprimi mian modestan opinion pri lia artikolo “For la **Ĥ**aoson!” aperinta en la numero Nov/Dec. 71 de “Oomoto”.

Estas kompreneble ke la Fundamento devas esti respektata — kaj mi pensas ke, ĝenerale, *ĝi estas* respektata; sed, unu afero estas respekti la Fundamenton kaj alia estas kateni sin kaj enfermi sin en cirklo de sensignifaj bagatelajoj.

Kio terura okazos se oni uzas indiferece “ujo” aŭ “io” por kelkaj landnomoj? Mi pensas ke diskuti pri landaj kaj propraj nomoj estas nura perdo de tempo, ĉar, ŝajnas al mi, ke tiu estas problemeto komuna al ĉiuj lingvoj. La tempo kaj la geografiistoj, kaj ankaŭ la ĝenerala uzado, aranĝos tiun negravan demandon.

Ĉi tio ne signifas malestimi aŭ spiti la Fundamenton, sed nur esprimi la opinion pri tio, ke oni ne devas esti tro konservativa, precipe pri aferoj kiuj neniel endanĝerigos la sanan, normalan kaj kontentigan evoluadon de la Lingvo.

La hodiaŭa stato de la afero estas tute alia ol tiu de la tempo de la Idoskismo. Hodiaŭ Esperanto jam estas sufiĉe kaj definitive forta kaj bone fundamentita kaj mirinde unuecigita en ĉiuj anguloj de la terglobo por timi ke ĝi disfalus en dialektojn, aŭ ion similan, kaj por paroli pri “ĥaoso” kiu vere ne ekzistas, almenaŭ ĉe la vere gravaj aspektoj de l’ afero. Estas mirindege legi literaturon el kiu ajn fonto kaj konstati la eksterordinaran unuecon kiun la Lingvo atingis. Estas krimo paroli pri ĥaoso. Hodiaŭ ekzistas jam neniam danĝero tiurilate, pro tio ke, kiel dirite, Esperanto jam estas la Lingvo Internacia sufiĉe forta kaj memstara por timi ian disfalon je dialektoj. La ekzemplo kiun D-ro Halbedl elmetas pri la Latino, ŝajnas al mi ke temas pri iom malsimila afero: La latinidaj lingvoj estiĝis pro

geografiaj kialoj kaj pro natura neceseco de malsamaj komunumoj, kiuj devis ellabori, kaj ellaboris siajn proprajn lingvojn; kio ne estas la kazo rilate la problemon de lingvo tutmonda.

La angla lingvo estas internacie parolata, kaj ĝi estas parolata bonege, bone, sufiĉe bone, malbone, malbonege kaj katastrofe malbone, kaj tamen, ĝi, — kiu akceptis en la pasinteco pogrande, kaj akceptas ĉiutage, novajn vortojn, — daŭras esti la Angla Lingvo, tute same kiel la Internacia lingvo estos jam por ĉiam la Lingvo Internacia, evoluanta, kompreneble, kiel ĉiu lingvo evoluadas. Kaj, kiam en la pli-malpli proksima estonteco ĝi estos vere la Lingvo Internacia kaj ne sole la “kara lingvo” de la esperantistoj, ne ekzistos povo sub la suno kiu kapablos eviti la uzadon de vortoj kaj esprimoj kiuj jam estas internaciaj kaj konataj de ĉiu homo mezklera. Kial ne uzi tiujn vortojn jam konatajn kaj signifoplenajn, anstataŭ krei pli longajn, kelkfoje iom kapricajn kaj multfoje kreitajn de memkontentigaj vortojonglistoj? Ĉu la vorto “trajno” ne estas pli ĝusta, pli oportuna kaj internacia ol la vorto “vagonaro”, al kiu, plie, mankas la lokomotivo? Kaj la uzado de tiuj vortoj neniel malutilos aŭ “ĥaosigos” la lingvon, nek kontraŭstaros la penson de D-ro Zamenhof, ĉar se li, tute prave — kiel li ĉiam pravis — insistis pri la netuŝebleco de la Fundamento, kaj diris ĉion kion D-ro H. mencias, li ankaŭ diris: “Ĉiun bonan esprimon kiu ekzistas en kiu ajn lingvo, lingvo arta havas plenan rajton aligi al si”. Kompreneble ke ĉio tio kalkulante kun la saĝa kaj konstanta kontrolo far la Akademio kaj la oficiala Vortaro.

Bone, ni ne faru la komenton tro longa; sed mi ne volas fini sen diri, ke mi konsideras multe pli kontraŭfundamenta kaj ĥaosgenera paroli tiel ironie pri la du homoj, kiel la aŭtoro de la artikolo parolis; kaj estas ege plaĉe al mi diri ke mi admiras la stilon, la fluecon, la mastrecon per kiuj D-ro Lapenna liveras siajn paroladojn kaj artikolojn kiujn mi trovas multe pli edifaj, pli klaraj kaj fundam entaj ol tiuj skribaĵoj de iuj aliaj... Pri la longa, daŭra kaj valorega laboro de K. Kalocsaj, mi pensas ke estas manko de respekto, aŭ malmanko de io alia, paroli tiamaniere.

Ĉio tio ne signifas ke mi ne trovas frafaj kaj akcepteblaj kelkajn el la avertoj de D-ro Halbedl, sed ni ne troigu la aferon. Mi kredas ke la ideala sinteno pri ĉio en la vivo estas la “Meza Vojo”, kio, sen ia dubo, estas la plej saĝa vojo.

ANIM-KALENDARO

(donita de D-ro Rudolf Steiner — daŭrigo)

H **Oka Semajno** (26a Majo — la Junio)

8 La povo de la sensoj kreskas
Lige al kreo de la Dioj ;
Ĝi malfortigas de l' pensad' la forton
Je la neklaro de la revo.
Kiam estaĵo Dia
Sin unuigi volas kun animo mia,
Pensado homa devas
En rev-estado modestigi sin trankvile.

I **Naŭa Semajno** (2a — 8a Junio)

9 Nun, forgesante mian vol-miaĵon,
Plenigas mondovarm', someron aŭguranta,
Al mi spiriton kaj animestajon ;
En lumo perdi min
Al mi ordonas la spirit-alvido,
Kaj forte al mi eksciigas alsentado :
Cin perdu nur, por trovi cin.

J **Deka Semajno** (9a — 15a Junio)

10 Someraj je altecoj
Altigas sin de l' suno la estaĵ' brilanta ;
Sentadon homan mian ĝi kondukas
En siajn spacovastojn.
Sin movas alsentante en interno
Percept' al mi neklare sciiganta,
Ci iam scios :
Cin sentis iu Di-estaĵo nun.

K **Dek-unua Semajno** (16a — 23a Junio)

11 En tiu ĉi sunhoru estas
Al ci, ekkoni saĝan la mesaĝon,
Al mondbeleco fordoninte,
Sentante cin en ci travivi :

La Homo-Mi sin perdi povas
Kaj trovi sin en Mondo-Mi.

L Dek-dua Semajno (24a — 29a Junio)

12 De l' mondoj la belecobrilo,
Ĝi nun devigas min el la animprofundoj
De l' propra vivo la Di-fortojn
Al mondoflugo liberigi ;
Forlasi ja mi mem,
Fidante nur serĉanta min
En mondolumo kaj en mondovarmo.

M Dek-tria Semajno (30a Junio — 6a Julio)

13 Kaj kiam estas mi en sens-altecoj,
Tiam en la animprofundoj flamas
El la fajrmondoj de l' Spirito
De l' Dioj la ver-vorto :
En grundoj de l' Spirito alsentante penu
Spirit-parenca trovi cin.

O Dekkvara Semajno (7a — 13a Julio)

14 Al sensrevelacio fordonante
Mi perdis de la proprestaj' impulson ;
Pensrevo, rabi ŝajnis ĝi
Al mi, ebriigante, Memon mian,
Sed jam vekante proksimiĝas
En ŝajno de la sensoj mondpensado.

P Dekkvina Semajno (14a — 20a Julio)

15 Mi sentas kiel ensorĉitan
En mondoŝajno la spiritteksadon :
Ĝi estas en neklaro de la senso
Kovrinta mian proprestajon,
Por doni nun al mi la forton,
Kiun, nepova doni al si mem,
Mia Mio estas jam en siaj limoj.

Q Deksesa Semajno (21a — 27a Julio)

16 Enfermi spiritdonon en interno
Al mi ordonas mia alsentad' severe,
Por ke maturiĝantaj Di-Donacoj

Kaj fruktigantaj en animogrundoj
La fruktojn de l' memaĵo portu.

R Deksepa Semajno (28a Julio — 3a Aŭgusto)

17 Parolas mondovort',
Kiun tra sensopordoj mi
En grundojn de l' anim' konduki rajtis :
Plenigu ciajn spiritoprofundojn
Kun miaj mondovastoj,
Por trovi iam min en ci.

S Dekoka Semajno (4a — 10a Aŭgusto)

18 Ĉu mi vastigi povas la animon,
Por ke sin mem ĝi ligu
Kun ricevita mondoĝermovort'?
Alsentas mi, ke devas trovi forton mi
Fasoni la animon dignoplene
Por formi sin je spiritvesto.

St Deknaŭa Semajno (11a — 17a Aŭgusto)

19 Misteroplene nun la nove-ricevitan
Ĉirkaŭi kun memoro,
Ĝi estu la intenco plua de l' celado mia :
Plifortigante tiu, proprafortojn
Senĉese en interno mia veku
Kaj, fariĝante, al mi donu min.

T Dudeka Semajno (18a — 24a Aŭgusto)

20 Nur tiel sentas mi estadon mian,
Kiu de mondestado malproksima
En si, sin mem estingi
Kaj nur fondante sur la propra grundo
En si, sin mem mortigi devus.

U Dudekunua Semajno (25a — 31a Aŭgusto)

21 Mi sentas fremdan povon fruktigantan
Sin fortigantan al mi doni min,
La ĝermon mi perceptas maturantan
Kaj alsentadon lumoplene teksu
En la interno al la povo de l' memaĵo.

“J. A. Komenský” en pedagogia muzeo de Komenský

Praha I. Valdštejnpalaco.

Kiel en la jaro 1957 (okaze de la 30-jara datreveno de eldono de ĉefa verkaro “Opera Didactica Omnia” en Amsterdam), tiel ankaŭ en 1970 en la kadro de tutmonda jubileo sub egido de UNESKO la Pedagogia Muzeo de Komenský en Praha aranĝis grandan ampleksan ekspozicion pri la verkado, vivo de Komenský okaze de la proksimiĝinta 300-jara mortdatreveno.

L’ ekspozicion vizitis kaj pozitive pritaksis ankaŭ la eksterlandaj vizitintoj el 27 ŝtatoj de diversaj kontinentoj, samtempe la partoprenintoj de internacia komeniologia konferenco, kiuj kune kun la ĉeĥaj kaj slovakiaj komeniologoj kunvenis dum la tagoj ekde la 8-a ĝis la 12-a de septembro 1970 por ĉiuflanke kaj reciproke al si klarigi kaj pridiskuti la rezultojn de novaj esploroj, koncentriĝintaj precipe al la plej maturiĝinta verko de Komenský “De Rerum Humanarum Emendatione Consultatio Catholica” (Ĝenerala Konsulto pri Plibonigo de Homaj Aferoj).

La ekspozicio vidigis konkrete sur

atingebla materialo (folioj, bildoj, libroj ktp) kun eksplikaj tekstoj kaj elektitaj citaĵoj el la verkaro de Komenský kaj pri li, — unue la radikojn de progresa hejma kultura kaj lerneja tradicio, precipe husana kaj tiu de la Unuo de Ĉeĥa Frataro. Krom la Majstro Jan Hus, Petr Chelĉický kaj Jan Blahoslav kiel la plej tipaj, poste ankaŭ videblas en la tempo humanisma kaj renesanca, ĝis kia grado la lernejo ĉe ni estis progresa ĝis la katastrofo sur la Blanka Monto — en sia humanisma kaj demokrata tendenco, kompare kun la eksterlando.

Oni povis vidi (en bildoj kaj verkaĵoj) karakterizitaj niajn elstarajn filozofojn kaj filologojn (precipe Jan Blahoslav kaj ankaŭ la elstaran libropresiston kaj historiiston Daniel Adam el Veleslavin kaj ankaŭ la vojaĝantojn-geografiistojn), kiuj konigis al niaj antaŭuloj la mondon kaj la agadon en ĝi (precipe la heroo Kryštof Harant el Polžice kaj Václav Budovec el Budov — ambaŭ poste la viktimoj de ekzekuto sur la Mal-

novurba Placo la 21-an de junio 1621) kaj Václav Vratislav el Mitrovice, favorantoj de l' intereso pri antikva kulturo (Bohuslav Hasištejnský el Lobkovice, ĉeĥa mecenato Jan Hodějovský kaj aliaj), elstaraj natursciencistoj kaj kuracistoj (Jan Jesenský el Jesenný — ankaŭ la viktimo de l' ekzekuto, Tadeáš Háiek el Hájek, kiu estis samtempe famekonata astrologo k.a.).

Tiuj ĉiuj kaj ankoraŭ multaj aliaj konsiderinde kontribuis al evoluo de la kulturo kaj kultura nivelo de la popolo.

Tria parto de la ekspozicio vidigis la damaĝojn de la lando dum la tridekjara milito sub peza trafo de Ferdinando la II-a, Karel el Lichtenštejn kaj de jezuitoj. Inter la multego da valoraj portempaj afiŝoj (tiamaj gazetoj), ofte en desegnaĵo kaj teksto satirsence kaj ironie tendencitaj unue kontraŭ Habsburgoj kaj la papo de la flanko de la protestantoj kaj male, de la flanko katolika-habsburga kontraŭ la rezisto kaj la protestantoj, elstaras la afiŝo supertempa kaj superpartia (“Europa vulnerata et querula” — Eŭropo vundata kaj ĝemanta pro reciproka mortigado de siaj infanetoj).

El indikita kadro (kie estas, kiel ankaŭ en la tuta ekspozicio, menciitaj eĉ la mondaj progresemaĵoj pedagogiaj kaj kulturaj tendencoj) poste elkreskas personeco de la “Instruisto

de la Nacioj” kaj de la “Prapatro de la Mondpaco”, kiu malgraŭ tiom da kruelaj sortovundoj neniam ĉesis esperi kaj kredi, ke iam venos la pli bonaj, pli favoraj tempoj, pli justa monda regularo, pli feliĉa estonteco kaj neniam li ĉesis tiucele per ĉiuj siaj fortoj kaj kapabloj batali.

La ekspozicio estis riĉigita per aldono de novaj dokumentoj, de tre interesaj originalaj gravuraĵoj el lia epoko, de pentraĵoj de la lokoj, kie li vivis, aktivis, de elstaraj personaĵoj, kiujn li renkontis, eĉ malnovajn valorajn landkartojn oni povas vidi (inter ili ankaŭ vidiĝas beleta eldonaĵo de Komenský-landkarto pri Moravio el j. 1627; la originalo troviĝas en la plej malnova Muzeo de Komenský en Přerov); videblas statuoj de Komenský, medalionoj kaj plakedoj. Inter la bildigoj de Komenský estas ankaŭ la origina reproduktaĵo de ekzakte bildigita pentraĵo de Václav Holar (en Londono 1642).

Estis tie pli ol 250 tempogravuraĵoj, 50 valoraj komenianoj, eldonitaj ankoraŭ dum la vivo de Komenský, 1000 aliaj dokumentoj, kiuj ebligas ankaŭ al neensekretigitaj vizitintoj same kiel al la lernantaro kaj junularo ĝenerale, ekkoni ne nur la vivon kaj verkaron de Komenský, sed ankaŭ “en kubo” la tre impresplenan agadon en Eŭropo en la 17-a jarcento.

En la lasta parto de l' ekspozicio

Danubvetura Sonĝo

La blanka ŝipo majeste naĝis sur la riverego. Ambaŭflanke oni vidis la ebenajon kaj norde, malproksime, la montojn.

“La blua Danubo estas verdire grizverda, sed ne blua,” diris Felsenhejm, altstatura germano, starante sur la ferdeko de la ŝipo tute antaŭe, kie flirtis granda verdastela flago.

“Ho, Kurt”, ekriis apud li brunulino kun ruĝ-blank-verda rubando super la kongresinsigno, “vi devus ami mian patrolandon, la malgrandan Hungarujon!”

“Se vi vidus Germanujon, niajn riverojn, montojn, la kastelruinojn, vi ne provus kompari tiun ĉi pejzaĝon kun mia patrolando, Verinjo!”

La knabino iom ekpaliĝis kaj

estis trarigardo de viva tradicio de Komenský ĉe ni ekde la nacia renescanco kaj esplorado pri li kaj signifo de lia heredaĵo (kun mencio de niaj elstaraj komeniologoj) kaj de la komeniologoj tutmondaj ĝis la nuntempo.

La ekspozicio daŭris ĝis la fino de januaro 1971, estis tage alirebla

flustris mallaŭte :

“Ŝajne vi neniam volas interkonsenti kun mi. Baldaŭ ni estos ĉe Esztergom ; mi volas klarigi ĝin al mia amikino, adiaŭ.” Kaj ŝi malaperis en la amaso de Esperantistoj, kiuj svarmis sur la ferdeko, vojaĝante al la Esperanto-Mondkongreso en Budapeŝt.

“Kial estas agrable piketi vundojn en knabinan koron”? demandis apud Felsenhejm juna, nigrahara bulgaro. “Ĉu ne estas pli agrable karesi ? Kial spiti kontraŭ la propra amo ?”

Felsenhejm mirigite rigardis lin : “Mi ne komprenas vin!”

La bulgaro ekridetis : “Eble vi ne bone komprenas Esperanton ? Sed

kaj ĉiam ĉeestis iu, kiu povis informi la vizitintojn. Nun ankaŭ la esperantistoj-vizitontoj povos akiri la E-ekzemplerojn kun la artikoloj pri J. A. Komenský, ĉar kreĝis tie ankaŭ la Esperanto-fako, kie la koncernaj E-revuoj estas alsenditaj kaj vicigitaj kiel la kontribuoj en aliaj fremdaj lingvoj. Tradukis : Jana Čichová

— kvankam de malproksime — mi bone rimarkis, ke vi povis multon paroli kun la hungara knabino, kaj vi ja reciproke ne konas la lingvon de la alia.”

“Esperanton mi bone komprenas, sed viajn vortojn, Sinjoro. . . .”

“Mi estas samideano, — via samideano Altveroff, — kaj mi jam konas vin, samideano Felsenhejm, el la antaŭkongreso en Vieno. Mi estis proksime al vi, kiam sur apudurba monteto vi kaptis forflugintan tukon de fraŭlineto Verinjo kaj konatiĝis kun ŝi.”

“Vi ĉeestis? Tiam mi ne komprenas. . .” balbutis Felsenhejm, iom perdinte sian kutiman firman sintenon. “Sed mi tiam ja vidis neniun alian personon en la proksimeco!”

“Eble vi jam forgesis aŭ ne bone observis min,” ridetis Altveroff, “ja ne gravas. Ni estas ĉiuj samideanoj. Almenaŭ ni devus esti. . . Sed se la homo amas, li ne hontu kaj ne kaŝu tion; almenaŭ ne antaŭ la persono, kiun li amas. Oni parolas pri homamo! Sed kiamaniere oni povas ami malproksimulojn, se oni ne lernas sincere ami eĉ tiun, kiu devus laŭ la sorto esti la plej proksima al la koro?”

“Strange vi parolas, samideano Altveroff, kvazaŭ vi konas la sorton.” — La bulgaro ne respondis, nur ridetis.

“Jen la malnova katedralo, kie vivis la plej altranga katolika ĉefepiskopo de la lando” — iu apud ili montris belan malnovan bazilikon, kiu tronis sur monteto apud la riverego.

“Ĉu la sorto faris, ke la ĉefepiskopo atingis sian rangon?” demandis ironie Felsenhejm.

“Ĉion faras la sorto de la homo, la destino. Sed la homo mem pretigas sian sorton. Vi eble ne scias, ke la iama hungara ĉefepiskopo de Esztergom estis iam malriĉa knabeto, la filo de simpla slovaka laboristo, kaj jen, li atingis la plej supran rangon de hungara katolika pastro.”

Felsenhelm rigardis pli serioze la bulgaron. “Kion vi studas?” li demandis, ĉar la junaj trajtoj kun la brilantaj okuloj montris studenton.

“Novan kulturon; la naskiĝon de nova mondo.”

“Naskiĝon de mondo? Tro malproksima problemo. Ni ja eĉ ne scias, kial ni naskiĝas, kiamaniere okazas, ke subite aperas homforma estaĵeto, kiu iom post iom evoluas kiel aganta, pensanta homo, kiel memstara individuo, superanta materion kaj beston.”

La bulgaro ekrigardis lin serioze. “Prave vi diris, samideano, vi ne scias tion. Sed mi jam scias ĝin. Por mi tio jam ne estas problemo.”

“Do klarigu al mi” — diris Fel-

senhejm, kiu sentis sin tre strange en la kompanio de Altveroff — “kial mi vivas? De kie venis mia individueco, mia karaktero, mia memo, kaj — kien ĝi iros iam, kiam mi mortos?”

“Vi deziras tro multon,” respondis la nigraharulo, “kion oni studis dum jaroj, oni ne povas klarigi dum amuzvojaĝo mallonga. Kaj eĉ se mi klarigus, vi ne kredus ĝin. Sed ŝajne vi jam mem pensadis pri tio, do vi povas facile konkludi, ke vi devis veni de ie kaj devos iri ien. Via memo, kiel vi diris, estis, kaj estos. Ĉar se la materio ne povas perdiĝi en la mondo, se ĉiu aganta forto venas de ie kaj iras ien, sen malapero el la mondscenejo, certe ne estas kredinda, ke ĝuste la pli alta vivaperaĵo, la sentanta, pensanta, karaktera individuo, aperas kaj malaperas sen postsigno.”

“Ĝi ja ne malaperas, nur ŝanĝiĝas,” diris Felsenheim.

“Nun vi diris la veron”, ekkriis Altveroff, “ĝi nur ŝanĝiĝas, sed ne kiel vi opinias, perdante sian memon! La memo restas eĉ en ŝanĝita formo. Vi ridetas! Sed antaŭ jardekoj oni estus ridetinta, se iu estus rakontinta pri nevideblaj elektraĵoj de sono, voĉo, eĉ de bildo. Ili tamen ekzistas, nun vi jam mem ne nur kredas, sed scias, ke nevidataj ondoj flugas ĉiam apud kaj super vi kaj tra vi kaj portas homajn sonojn al aliaj mond-

partoj. La scienco nur malgrandpaŝe malkovras la fortojn kaj leĝojn de la mondo. Ĉu vi do ne povas kredi, ke similmaniere nevideblaj fariĝas la memoj de la teraj homoj, kiam pro sorto nekomprenebla al ili, ni devas forlasi la homan korpon? Ĉu vi ne povas kredi, ke tiuj nevideblaj memoj povas poste ekaperi en la korpo de novnaskito kaj tralukti novan vivon, eble ian daŭrigon de la antaŭa, eble ties sekvon, kaj rilate al la lasta, la eblecon al plibonigo kaj al atingo de ia progreso?”

“Strangaj, novaj ideoj — kaj tamen iom amikaj,” respondis Felsenheim. Mi ne povas nun pripensi, mi ne povas nun kredi tion sed mi volonte parolos kun vi pri tio dum la kongreso. Mi estas scivola, kial mi devas nun vivi? Kion mi devas nun fari? — Mallumiĝas jam, mi provos dormi en la kajuto. Ĝis revido!”

“Ĝis...” ridetis Altveroff, kaj ili disiĝis.

La ŝipo naĝis sur la trankvila akvo inter montaroj. La suno subiris. Felsenheim sentis strangan dormemon kaj jetinte sin sur la liton de la kajuto, tuj ekdormis.

En la kalejdoskopa sonĝo li estis kavaliro de iu pasinta jarcento. Li vizitis la kastelon de hungara reĝo, sur la pinto de monto super la rivero. Kavaliroj, artistoj, scienculoj el

diversaj landoj estis tie, ĉiujn oni regalis gastame. Sed lin ne interesis la kortega brilo, la belaj ĉasadoj en la proksima arbarego, ĉirkaŭanta la monton. Li vagadis sur la deklivoj de la monto, inter remparoj, ĝis loko, kie staris malnova turo nomita la turo de reĝo Salomono. Tiun hungaran reĝon, laŭdire iam malliberigitan, tenis tie la nobeloj. Sed tiuj malnovaj tempoj ankaŭ ne interesis lin. Knabino atendis lin tie. La filino de la turgardisto.

“Verinjo,” li diris ekvidante ŝin, “venu nun kun mi en la kastelon. La kortego forraĵdis, neniuj ĝenos nin; via patro estas malproksime.”

La knabino rigardis lin kun ek-timigitaj okuloj. “Kurt,” ŝi diris, “vi scias, ke mi amas vin, sed vi... vi... ne vere amas min.”

Li ekkoleris. Li pasie amis la belan hungaran knabinon, li pensis kun malĝojo al la proksima tempo, kiam li devos reiri al sia patrolando, kaj ne pripensis ankoraŭ, ĉu li iam sukcesos forgesi ŝin. Sed edziĝi kun ŝi? Li, la germana nobelo! La imperiestra kavaliro! La amiko de la reĝo! Honta penso. — Li provis klarigi. Li minacis, postulis, petegis. La knabino restis firma, kvankam estis videble, ke ŝia animo estis morte vundita. — Subite eksonis trumpetoj. Parto de la kortega rajdantaro ekaperis sur la vojo apud la turo. Kurt

volis retiri sin kun la knabino, sed ŝi luktis kun li ĉe la rando de la remparo.

“Ha, Kurt, vi trovis ankaŭ belan ĉasaĵon,” aŭdiĝis rideganta voĉo de preterrajdanta kavaliro, — “vi estas prava, via ĉasbirdeto bone amuzos vin dum la kelkaj semajnoj, kiujn vi ankoraŭ restos en Visegrád. Nia ĉasaĵo jam mortfalis hodiaŭ.”

En tiu momento la knabino liberigis sin el liaj brakoj per forta ektiro, perdis la ekvilibron, kaj falegis de la remparo en la abismon. La korteganoj jam estis for. Kurt ekkriegis. Sed sur la roko apud la riverbordo kuŝis sanga korpo, ne plu revivigebla. — “Ho Dio!” ekkriis Kurt, “se mi povus nuligi la rezulton de mia vanteco, de mia peko, mi certe amus ŝin fidele kaj ĝismorte, eĉ se la tuta mondo estus inter ni.”

La ŝipo ekskuigiĝis. Felsenheim rekonsciiĝis el sia stranga dormo. Jam estis mallume. Li rapidis al la ferdeko por enspiri freŝan aeron. — Sed kiu estas tie? La rivero formis per kurbiĝo kvazaŭ belegan lagon. Ambaŭflanke estis montoj, kiuj rememorigis al li la plej belan Rejnregionon. Antaŭ li leviĝis monto lumigita en arĝenta lunbrilo. Ĉio estis al li konata. Sur la monto videbliĝis ruinaĵo, ankaŭ sur la deklivo. Ĉirkaŭe vastaj arbaregoj. Super la bordo,

super rokoj, elstaris stranga turego kontraŭ la ĉielo.

“La turo de Salomono” — klarigis iu en la nigra amaso sur la ferdeko. Felsenheim rigardis kun strange malfermitaj okuloj. Li rekonis la pejzaĝon. Li sentis liberigon de la granda pezo preminta lin ĝis nun.

“Visegrád!” li ekkriis entuziasme. Kaj li pensis pri Verinjo, lia Esperantista konatino, kiun li amis de post la unua ekvido ĉe ekskursejo apud Vieno, kaj kiu montris al li reciprokam amon, sed kiu estas filino de simpla budapeŝtano, vendistino en magazeno, kaj ŝparis la tutan jaron, por ebligi al si partoprenon en Esperantista ekskurso kaj ekkoni fremdajn regionojn. Ĉion ŝi jam sincere rakontis al li dumvoje; ŝia bona, klara animo malfermiĝis antaŭ li, kaj li sciis, ke li neniam amis iun, krom tiun knabinon, konatan nur de kelkaj tagoj. Sed — li estas riĉa fabrikposedanto el plej bona burĝa familio de germana urbo, konata persono. — “Dumkongresa amuzado, bone; ni amuziĝu kaj ne pripensu kio estos, ni ŝercu, piketu, ludu. Sed poste...” Fulmrapide trazigzagis sian menson ĉiuj ĉi tiuj pensoj. “Sed poste...?”

“Jes Visegrád!” eksonis apud li arĝenta knabina voĉo. “Sed kiamaniere vi scias tion en la mallumo, vi ja ankoraŭ neniam estis en Hungarlando dum via vivo!”

“Verinjo,” ekkriis Kurt, “mi rekonis Visegrád, ĉar mi amas — Hungarlandon!”

“Mi sentis, ke vi ŝanĝos vian opinion, Kurt, kiam vi venos pli profunden en nian iam multe suferintan landon. Vi ja estis antaŭe iom neĝentila, Kurt; mi dankas vin, ke vi rebonigis vian agon! Do ni restos ĉiam bonaj amikoj, ĉu jes?”

“Jes Verinjo, mi volas ĉion rebonigi. Kaj esti bonaj veraj amikoj ĉiam se vi ankaŭ tiel volas...”

Sur la nigra ĉielo eklumiĝis antaŭ ili la horizonto. Estis la lampoj de Budapeŝto. Kaj kiam la ŝipo ennaĝis inter la palacbroditaj bordoj, sub la majestaj pontegoj, ĉirkaŭataj de miloj da lampoj sur la kajoj, Verinjo kaj Kurt, sidante sur la antaŭaĵo de la ŝipo kaj tenante reciproke la manojn, tute trasentis la vortojn diritajn super ilia kapo sur la ferdeko:

“Sed ni ja alvenis en felandon...”

Dum la kongreso Felsenheim vane serĉis samideanon Altveroff, por paroli kun li laŭ lia promeso pri la senco de la vivo, pri naskiĝo kaj morto. La bulgaro estis nenie trov-ebla.

“Altveroff?” demandis servopreta deĵoranto en la kongresoficejo kaj tuj traserĉis la liston de la kongresanoj, “persono kun tiu nomo ne partoprenas nian kongreson, Sinjoro.”

(1929)

La naturaj faktoroj de kuracado

Homo, kiu strikte observas la naturajn leĝojn, kiuj regas lian vivon, ne timas la malsanon, ĉar li posedas la naturan imunecon kaj rezistokapablon, kiuj ŝirmas kaj protektas lin.

Male, se li ne respektas ilin, li pli-malpli baldaŭ malsaniĝas. Se li volas resaniĝi, li devas reveni al la strikta observado de la leĝoj de kiuj li apartiĝis, ĉar la samaj elementoj, kiujn la naturo donis al li por konservi la sanon, ankaŭ taŭgas por ĝin reakiri.

La naturista medicino uzas ĉiujn naturajn faktorojn por kuraci malsanulon, ĉar ili ĉiuj estas gravaj, kvankam ne samgrade.

Dietoterapio, tio estas kuracado per la dieto, estas la fundamento de la naturista medicino sen kiu ne eblas atingi certan, sekuran rezulton. Nur post tiu esenca elemento venas la aliaj, kiuj povas forte kontribui al la fina sukceso.

Oportuna kaj prudenta utiligo de la faktoroj de kuracado kun konsidero al la individua kondiĉaro de la malsanulo kaj al la medio estas la ĉefaj punktoj de la naturkuracista arto.

DIETOTERAPIO

(*kuracado per la dieto*)

Antaŭ 25 jarcentoj Hipokrato, la patro de la medicino, diris: "Via nutraĵo estu via kuracilo". Tiu saĝa aforismo, tro ofte ignorata de la homoj, estas ĉiam aktuala kaj indikas la fundamentan gravecon de la dietoterapio.

Fastado. — Kiam oni celas rapidan kaj kompletan sentoksiĝadon, oni devas fasti, tio estas, sin deteni de nutraĵo dum pli-malpli longa tempo. Escepte de homo tro malforta aŭ grave malsana, iu ajn povas fasti senriske dum 1, 2 aŭ eĉ 3 tagoj kun nur kelkaj elementaj antaŭzorgoj. Se la fasto daŭras pli ol 3 tagojn, prefere ĝi estu kontrolita de naturkuracisto.

La absoluta plena fasto, kiu konsistas en sindeteno de eĉ akvo, estas necesa nur esceptaokaze (ekzemple dum la daŭro de stomaka aŭ intesta hemoragio) kaj devas daŭri ne pli ol kelkajn horojn.

La akva dieto konsistas el akvo simpla aŭ minerala kun aŭ sen citronosuko, maltkafo, infuzoj aŭ

dekoktoj de kuracaj herboj, laŭ la malsano, dekokto de legomoj (oni trinkas nur la rezurtantan likvaĵon, kompreneble, sen salo kaj sen oleo), k. t. p. Trinkota kvanto laŭplaĉe.

Malpli severa fasta dieto konsistas el filtrita suko de freŝaj maturaj fruktoj, sukoj de ĉiuspecaj freŝaj krudaj legomoj (muelu aŭ raspu ilin subtile kaj la raspitaĵon filtru aŭ elpremu en peco da stamino; aŭ uzu elektran elpremilon tiucele); maceraĵo de sekigitaj fruktoj (pece-tigu ilin kaj lasu en malvarman akvon dum 12-24 horoj); migdala lakto (trempu 60 gramojn da senŝeligitaj migdaloj en malvarma akvo dum la nokto; senhaŭtigu ilin pere de varma akvo; fajne pistu aŭ likvigu ilin aldonante tason da akvo iom post iom; ripozigu la pistaĵon dum 2-3 horoj kaj poste filtru aŭ elpremu ĝin en peco da stamino; oni povas dolĉigi ĝin per iom da mielo), k. t. p. Trinkota kvanto laŭplaĉe.

La fastanto devas aplikiĝi ĉiuvespere klisteron de 1 litro da tepida akvo, dum la tuta daŭro de la fastado, eĉ se li spontanee fekas. Krome li devas ripozi en trankvila medio kaj favora etoso.

Kiam la fasto daŭras pli ol unu tagon, oni devas esti singarda pri la rekomenco de la manĝado. La unuan tagon post la fasto manĝu nur fruktan pulpon ĉiu 2 aŭ 3 hore, malgrandkvante. La duan tagon manĝu iom da kaĉo el terpomoj kaj aliaj legomoj tagmeze kaj vespere; kaj fruktan pulpon matene kaj

posttagmeze; la sekvantajn tagojn pliigu iom post iom la kvanton kaj diversecon de la manĝaĵoj ĝis atingi la normalon. Inter la manĝoj, se vi soifas, trinku maltkafon aŭ tizanojn dolĉigitajn per mielo. Ju pli longa la fastado, des pli singarda oni devas esti pri la rekomenco de la manĝado.

La fasto estas la plej drasta kaj efikoplena kuracilo, kiun ni disponas; kaj ĝi estas sukcese aplikebla en multaj malsanoj: digest-, hepat-, ren-, haŭtmalsanoj, dum febro, k. t. p.

Dieta el fruktoj. — La fruktoj, vera beno de la Naturo, estas la plej perfekta homa nutraĵo ekde la plej frua infanaĝo ĝis la ekstrema maljuneco.

En sia diverseco ili enhavas ĉiujn nutrajn substancojn nepre necesajn por la vivo, kaj estas mirinde kapablaj ne nur nutri, sed ankaŭ kuraci.

Malpli rigora ol fasto, la dieta el fruktoj estas aplikebla al preskaŭ ĉiuj malsanoj kaj povas senriske daŭri plurajn tagojn kaj eĉ semajnojn. Jen la procedo:

Manĝu nur maturajn krudajn fruktojn. Maksimuma kvanto: 2½ — 3 kilogramojn en 24 horoj disdividitajn en 4 aŭ 5 manĝoj (aŭ pli ofte, laŭvole). Bone purigu ilin kaj, se eble, manĝu kun la ŝelo, maĉante. Se la fruktoj estas haveblaj en sufiĉa kvanto, manĝu nur unu specon; kontraŭe, aŭ se tiu monotoneco enuigas vin, manĝu diversajn specojn, sed ne miksu ilin en la sama

manĝo, laŭeble.

Ĉar la fruktoj estas iom laksetigaj, la ĉiutaga klistero ĝenerale ne estas bezonata dum tiu ĉi dieto. Ankaŭ trinkaĵoj ne estas bezonataj, ĉar fruktoj estas ja sensoifigaj: sed, se vi nepre volas ion trinki, preferu malkafon aŭ tizanojn dolĉigitajn per mielo. Trankvileco kaj relativa ripozo estas konsilindaj,

Kruda nekuirita dieto. — Kiam oni bezonas ne tro draste purigi la organismon, aŭ kiel sekvanta ŝtupo post la dieto el fruktoj, oni observas la jenan krudan nekuiritan dieton:

Matenmanĝo kaj posttagmeza manĝeto: Ĉiuspecaj krudaj maturaj fruktoj. Tag- kaj vespermanĝo: Abunda telero da kruda salato (laktuko, tomato, kukumo, ajlo, bulbo, celerio, rafaneto, kreso, fenkolo, cikorio, petroselo, k. t. p.). Miksu kiel eble plej multajn, almenaŭ ses, krudajn legomojn. Spicu per citronosuko, tre malmulte da natura salo kaj iom da oleo. Se vi ne kapablas bone maĉi, muelu, raspu, pecetigu, pistu aŭ likvigu la salaton antaŭe. Oni povas aldoni duon-kulerplendon da kruda ĝermo de tritiko kaj saman kvanton da manĝeblaj maraj algoj. Se ne estas kontraŭindiko, aldonu ankaŭ kelkajn nuksojn. Malproksime de la manĝoj vi povas trinki sukcon de fruktoj, malkafon aŭ tizanojn dolĉigitajn per mielo.

Sama dieto kun pano. — Al la kruda nekuirita dieto aldonu ĉiutage 2 aŭ 3 tranĉaĵojn el nefreŝa sekala aŭ tritika integra pano. Tiel

ĝi fariĝas malpli severa.

Dieto el fruktoj kaj kuiritaj legomoj. — Kelkaj pacientoj ne bone digestas krudajn salatojn, eĉ se antaŭe muelitaj, raspitaj, pistitaj aŭ likvigitaj. En tiu okazo ili devas rezigni ilin manĝi je la komenco, anstataŭigante ilin per telero da diversaj kuiritaj legomoj: terpomo, kukurbo, beto, napo, blito, okzalo, spinaco, karoto, melongeno, asparago, artiŝoko, poreo, verda fazeolo, k. t. p. Kelkuloj eĉ ne digestas krudajn nekuiritajn fruktojn kaj devas anstataŭigi ilin per kuiritaj aŭ bakitaj. Bedaŭrinde en tiu okazo la efikeco de la dieto malpliĝas, ĉar mankas en ĝi la vitaminoj kaj aliaj biologiaj elementoj de la krudaj vegetaĵoj, kun ties grandega kuraciga povo, kiujn la varmego de la fajro detruas. Tamen tiu dieto povas provizore utili ĝis la normaligo de la digestado.

Vegetara dieto sen laktaĵoj kaj ovoj. — Matenmanĝo kaj posttagmeza manĝeto: Ĉiuspecaj krudaj maturaj fruktoj. Tag- kaj vespermanĝo: Unua telero da kruda salato. Dua telero da diversaj kuiritaj miksitaj legomoj aŭ integra cerealo (tritiko, hordeo, aveno, sekalo, maizo, rizo, k. t. p., ne miksante ilin) aŭ vegetara supo. Tio signifas du telerojn entute. Aldonu ĉiutage 2 aŭ 3 tranĉaĵojn el nefreŝa sekala aŭ tritika integra pano. Tiu-ĉi dieto estas rekomendinda, kiam la paciento ne bone toleras lakton, kremon, buteron, fromaĝon kaj ovon, kio ofte okazas en alergio,

astmo kaj kelkaj hepat-, digest-, ren- kaj haŭtmalsanoj.

Normala vegetara dieto. — Al la antaŭa dieto aldonu ĉiutage (aŭ ĉiudutage) en la tagmanĝo unu ovon, kaj en la vespermanĝo iom da fromaĝo. En la matenmanĝo vi povas kelkfoje trinki iom da lakto kun aŭ sen maltkafo kaj manĝi iom da sekala aŭ integra pano kun mielo, kremo aŭ butero. Sed ne flankenlasu la fruktojn; vi povas eĉ miksi ilin kun lakto aŭ jogurto.

Fortiga vegetara dieto. — Al la antaŭa dieto aldonu ĉiutage (al via telero da kruda salato aŭ al iu alia telero) duon-kulerplenen da kruda ĝermo de tritiko kaj saman kvanton da manĝeblaj maraj algoj. Ĉe ellitiĝo prenu 1 aŭ 2 kafkulerplenojn da sekigita bierfermentilo miksitaj kun iom da akvo aŭ suko de fruktoj aŭ maltkafo. Unu horon antaŭ vespermanĝo prenu kulerplenen da ekstrakto el malto. Manĝu plenmanon da nuksoj. Enstomakigu glason da suko de krudaj spinaco, karoto kaj aliaj haveblaj krudaj legomoj (raspu aŭ muelu ilin antaŭe) kaj la ŝelon tre subtile pistitan de 1 aŭ 2 ovojn (oni povas ĝin solvi en iom da citronosuko). Ĉiudutage manĝu sojofabon aŭ lenton aŭ pizon, k. t. p. Tiuj aldonajoj enhavas proteinojn, vitaminojn, mineralajn salojn kaj aliajn organikajn kaj biologiajn elementojn, kiuj tre utilos ĉe tuberkulozo, anemio, malforteco, k. t. p. Uzu ilin laŭbezono kaj laŭkaze jen kune, jen aparte.

Senceluloza dieto. — La celulozo

estas solida substanco, kiu konsistigas la ĉelparieton de la vegetaĵoj. Ĝia ĉefa funkcio en la digestado estas meĥanika, ĉar ĝi favoras la peristaltajn kontraĥiĝojn de la intestoj malebligante tiel la mallakson.

La junmola celulozo de kelkaj vegetaĵoj (karotoj, rafanetoj, laktuko, k. t. p.) estas normale solvita kaj digestita en la homa intesto en granda kvanto (ĝis 60%). Sed ĝi ne estas bone tolerata kaj povas eĉ malutili, precipe se ĝi estas malmola, ĉe kelkaj malsanoj kaj perturboj de la digesta aparato: gastrito, enterito, kojlitio, ulceroj de la stomako, de la duodeno kaj de la kojlo, kelkaj dispepsioj, spasma mallakso, k. t. p. En tiuj kazoj evitu, almenaŭ en la komenco, la ŝelon kaj semojn de fruktoj kaj legomoj, kaj la branon de cerealoj (tial ne manĝu integran kaj sekalan panojn, escepte se faritaj el tre subtila faruno). Nur post resaniĝo vi povas denove ilin manĝi.

Sensala dieto. — Oni ĝenerale trouzas la salon kaj tiu trouzado nocas la organismojn. Ne uzu pli ol 2 aŭ 3 gramojn da salo ĉiutage, konsiderante, ke la diversaj manĝaĵoj jam entenas ĝin diverskvante. Nur tre esceptaokaze, kiam la organismo perdas multan kloron kaj akvon (abundaj ŝvitado, vomoj, diareoj, k. t. p.), estas konsilinde uzi pli ol tiun kvanton ĝis malapero de la senkloridiĝo.

Ĉe diversaj malsanoj oni devas tute sin deteni de salo: ren- kaj

Ĉe la ĉielpordego

Ĉi tie estas mallonga ekstrakto el la rakonto "Raganius (Sorĉisto)" de V. Krévé (1882-1954), klasikulo de la litova literaturo.

La antaŭaj ĉapitroj kolorriĉe pentras la vilaĝan vivon en Litovujo proksimume antaŭ jarcento; la popolo, premata de la carismo stagnis kulture, malprogresis ekonomie. Ĉarme primitiva estas la ĉefpaŝtisto Gugis, gajninta pro siaj mensaj kapabloj la kromnomon sorĉisto.

En nia ekstrakto ni trovas lin en lia postmorta penado trafi ĉielen. La aŭtoro gajhumore prezentas, kiel la simpla malklera vilaĝano imagis transcendan mondon laŭ la religia instruo. La ĉefpaŝtisto (pli ĝuste — ties animo postmorte) ĉi tie vagas akompanata de sia najbaro-terkulturisto Kukis, kies enterigon li partoprenis kaj, revenante hejmen, mem formortis...

Kiam ili interparolante alvenis al la ĉielpordego, subite ekblovis frosta vento kaj ekneĝis per neĝoflokoj grandaj kiel papilioj. Tamen mirinda estis tiu ĉi neĝo, nevidita de la homoj, loĝantaj sur la tero. Kien ajn la neĝeroj faladis, tie ili ekflamadis, kaj pro tio la ĉielpordego aspektis flammanta, ĉirkaŭita de fajro.

Ĉion ĉi ekvidinte, Kukis tuj kaptis la ĉefpaŝtiston ĉe la basko.

— Ci vidas, ci vidas, kio okazas.

kormalsanoj, ĉefe kiam ili estas akompanataj de funkcia nesufiĉeco kaj edemoj (ŝveliĝoj) pro retenado de natria klorido; arterisklerozo kaj alta sangopremo; ekzemo; grasdikeco, k. t. p. Ĉe alergio, nervaj malsanoj kaj gravedeco la sensala aŭ preŝkaŭ sensala dieto estas

Mi diris, ke ne endis elekti tiun ĉi vojon. Nun ne devos iri returne.

— Kien returne?

— Tien, kie la vojoj disiĝas. Ni devos ekiri alian vojon.

— Ĉu do ci deziras, ke ni vojiru al la purgatorio aŭ al la infero?

— Kien ĉiuj, tien ankaŭ ni. Ne vane ĉi tiun vojon, krom ni mem, eĉ ne unu animo ekvojiris. Do tien, ci mem vidis, kiom piedis da episkopoj,

ankaŭ rekomendinda. La manĝotaj pano, butero, fromaĝo, k. t. p. devas esti ankaŭ sensalaj, kompreneble.

Por gustigi la nutraĵojn uzu anstataŭe citronosukon, tomaton, ajlon, cepon (bulbon), laŭron, organon, k. t. p.

(*Daŭrigo*)

da pastroj kaj da aliaj kleraj sinjoroj.

— Ci opinias, ke tie estos pli bone? Ne, frat'. Ja tie, laŭdire oni devos bruli en la fajro! Estos pli bone ke ni ĉi tie iom suferu, ol ke ni tie devu longan tempon en la flamoj bruli. Foje ni jam atingis la ĉielpordegon, ni devas frapi.

Kukis gratis la kapverton. . .

— Estas timige, frat'. . .

— He, ne timu. Duan fojon ni jam ne mortos.

— Kiel ne senti timon, se sankta Petro, onidire, estas plisupera eĉ ol la episkopoj.

— Estu li pli alta ol la episkopoj, ĉu do mi lian panon mangas, ke mi devus timi lin? Ne, frato, loĝante sur la tero mi timis nenion, do kial mi devus timi nun, kiam mi estas jam mortinta.

Kaj li komencis forte frapi al la ĉielpordego. Post la pordego neniu aŭdigis sin, nur la eĥo sonis, samkiel somere en arbaro.

Kukis kurbiĝis pro timo, ĝibiĝis kaj iom retropaŝis.

Post kelka tempo aŭdiĝis paŝoj post la pordego. Kvazaŭ iu tre maljuna irus, pene trenante la piedojn.

— Kiu tie frapas tiel forte, ke ĝi eĉ malhelpis mian ripozon? — demandis tiu, kiu lante proksimiĝis al la malantaŭa flanko de l' pordego.

— Supozeble ci estas sankta Petro? — demandis Gugis.

— Jes, mi estas sankta Petro. Sed kion ci bezonas? Kial ci vagas ĉi tie, kvazaŭ senazila spirito?

— Kion alian mi povas fari, se mi hieraŭ mortis kaj ne trovas lokon por mi.

— Sed kiu ci estas, de kie ci venis kaj kial ci opinias, ke mi devas enlasi cin en la ĉielon?

— Mi estas Kazis Gugis, ĉefpaŝtisto el la vilaĝo Ramunai. Hieraŭ mi mortis, kien do mi iru, se ne en la ĉielon!

— Nome tiel, ke ne en la ĉielon. Kiun mi devas enlasi ĉielen, pri tio oni sciigas min anticipe, sed pri ci mi aŭdis nenion.

Post ioma paŭzo li daŭrigis:

— Mi aŭdis sonorilojn pri iu Jonas Kukis, sed pri Gugis nenion mi aŭdis.

— Jen, oni sonorigis pri mi, — kun ĝojo aŭdigis sin Kukis kaj pli kurage alproksimiĝis al la ĉielpordego.

— Ni du tie atendas, kiel mi aŭdas? — ekmiris sankta Petro.

— Nu jes, ni du estas, ne unu, — respondis al li Gugis. — Pli rapide malfermu la pordegon, sankta Petro, kaj lasu min en la ĉielon. Estas malagrabla staradi ĉi tie antaŭ la pordego.

— Kiel mi povas lasi cin ĉi tien se mi ne scias, kien vojiri estas al ci destinite. Eble en la purgatorion aŭ eĉ en la inferon?

— Jam mi mem scias, sankta Petro, kiel al mi decas, kaj se mi petas ĉielen, estas klare, ke tio al mi apartenas; sed pro kio neniu sciigis cin pri mi, en tio ne mi kulpas, sed ĉiuj anĝeloj, kiuj devis antaŭsciigi cin.

— Sed kial pri ci eĉ ne la preĝejoj sonoriloj sonoris? Eble ci ne estas katoliko, aŭ eble ci mortis kiel nekatoliko.

— Katoliko, li estas vera katoliko, — atestis, amike protektante, Kukis, — sed li estis iomete sorĉisto, tial Dio al li ne permesis morti, kiel mortas bona katoliko.

— Ci aŭdas, ci aŭdas, kion diras cia amiko, — ekmiris sankta Petro. — Eĉ sorĉisto ci estis en la tera vivado kaj mortis sen pastro! Kial do mi povas ĉi tian akcepti en la ĉielon?

— Ĉu mi estas kulpa pro tio, ke mi, revenante post la enterigo de tiu ĉi najbaro, kiu apud mi staras kaj balbutas sensencaĵojn, mi perdis la vojon kaj frostmortis. Anstataŭ trafi en mian kabaneton, mi trafis en marĉejon.

— Ne mensogu! Kiel oni povas anstataŭ en la kabaneton, trafi en marĉon.

— Okazis al mi tia malfeliĉo, sed kiel ĝi okazis, mi mem ne scias. Eble ĝi ne estus okazinta, se mi en la enterigofesteno ne estus iom drin-

kinta.

— Kiel mi vidas, ci sorĉadis, ci drinkadis kaj, krom tio, ci mortis malsobra kaj sen konfeso!

— Jes, estis tiel, ke mi drinkadis, sed neniam tro multe.

— Li drinkadis, sankta Petro, kaj eĉ kiom! — ree enŝovis sin Kukis. — Ne unu fojon mi provis riproĉi lin, sed ĉu li obeos! Li nur primokadis min. Li ne indas esti lasita en la ĉielon, prefere li iom turmentigu en la purgatorio.

— Ĉu ci aŭdas, kion parolas cia amiko? Kaj ci aŭdacas ĉielen penetri. Iru, iru, de kie ci estas veninta!

Kaj sankta Petro, kiel oni povis diveni laŭ la paŝoj, turnis sin kaj jam ekiris retro, tintante per la ŝlosiloj. Sed la ĉefpaŝtisto komencis tiel forte frapi al pordego per la pugnoj, ke la mastro de la ĉielpordego estis devigita reveni.

— Kiel ci bruas kaj malkvietas vane? Ĉu ci ne aŭdis, kion mi diris al ci! — kolere insultis sankta Petro.

— Mi devas brui kaj malkvieti, se ci parolas vantaĵojn, sankta Petro. Se homo, estante viva, iomete drinkis, ĉu li jam tiel pekis, ke li eĉ ne povas esti enlasita en la ĉielon! Ja ci mem ankaŭ drinkis tie en iu edziĝofesto, vivante surtere. Ĉu ci forgesis tion?

— Jes, mi drinkis, sed per tio mi al neniu kaŭzis malbonon, mi nur faris plezuron al la mastroj kaj al la

geedziĝantoj.

— Tiel same ankaŭ mi, ĉu mi drinkante faris al iu malbonon, diru, diru, sankta Petro ?

Sankta Petro, iom silentinte, ekparolis :

— Estas vere, pri tio mi estas nenion aŭdinta. En la ĉielon ne venis plendoj.

— Sed, sankta Petro, — ree ne detenis sin Kukis, — li pli ofte vizitadis la drinkejon ol la preĝejon. Per tio li indignigis pli ol unu homon, kaj mi pro tio pli ol unu fojon insultis lin.

— Ci aŭdas, ci aŭdas, — ekĝojis sankta Petro, — kion tiu bona homo parolas pri ci. Mi ne vane rifuzas lasi cin en la ĉielon.

— Tiu ĉi bona homo balbutas sensencaĵojn. Sur la tero vivante li emis senbezone insultadi la homojn, kaj, videble, ankaŭ postmorte li ne perdis tiun ĉi kutimon.

— Sed tamen estas la vero, ke ci la preĝejon vizitadis pli malofte ol la drinkejon. Ĉu ne estas vere, ĉu ?

— Eble tio estas vera, mi ne kontraŭdiras, sed ci, sankta Petro, vivante sur la tero, ĉu ci pli ofte vizitadis la preĝejon ol mi ?

— Al mi pro la laboroj mankis tempo.

— Nu, mi paŝtis brutaron, kiun mi ne povis restigi sub gardado de la infanaĝaj paŝtistoj. Ĉu do mi ne

devis kompati la brutetojn, ke ili ne estu malsataj ?

— Certe, eble tie ĉi estas nenia kulpo. Sed tamen ci formortis sen pastro kaj eĉ ebria! . . .

— Ĉu tio ĉi estas peko ? ĉu mi deziris tion ? Por diri la veron, mi tute ne preparis min por morti, do se mi tiel subite kaj neatendite mortis, ja estas nenia mia kulpo.

— Nu, ci vidas, ci vidas, kia malmolkapulo ci estas ! Ci pekis, kaj ne konfesas, ke ci estas kulpa.

— Ni supozu, ke mi pekis. Do ci, sankta Petro, ĉu ci ne estis pekinta kontraŭ Dio ? Ja ci eĉ trifoje malkonfesis Lin, sed mi neniam forĝesis Lian sanktan nomon, eĉ malsobra mi gloradis Lin.

— Jes, mi estis pekinta, profunde pekinta, sed mi pentofaris pro tio kaj ĝis nun mi pentas, — per ploretanta voĉo parolis al li sankta Petro.

— Kiel mi povis pentofari, se mi subite mortis kaj pro tio al neniu faris malbonon. Ci vidas, ke ci estis pli granda pekulo ol mi, kaj tamen ci estas mastro de la ĉielpordego kaj eĉ ne deziras lasi min en la ĉielon. Ĉu tio estas bona, ĉu tio estas justa, sankta Petro ? . . .

— Estas evidente, ke dum la tera vivo ci bone ekzercis ĉian langon, kaj mi ne kapablas pruvi al ci, ke ci eraras, postulante, ke mi lasu cin eniri la ĉielon. Atendu, mi vokos

iun pli elokventan.

— Sed ne prokrastu longe, sankta Petro. Ne forgesu, ke tie ĉi antaŭ la ĉielpordego, estas tre malagrable atendadi.

— Tuj, tuj ! — maltrankviliĝis sankta Petro kaj kure lasis sin ĉielprofunden.

— Mi tute ne kredis, ke ci povoscias tiel paroli, — Kukis eklaŭdis la ĉefpaŝtiston. — Sed prefere ne parolu tiel kuraĝe : ci povas kolerigi.

— Se mi en la ĉielo ne parolos la veron, do kie mi devos paroli ĝin ? — demandis lin la ĉefpaŝtisto.

— Ci parolas la veron ? Nu, frat', se ci eniros en la ĉielon, tie ĉi malmulte da vero. Mi aŭskultis kaj miris pri cia kuraĝo.

*

Kiam ili tiel babilis, venis sankta Petro.

— Jen, mi alkondukis la plej amatan apostolon de Sinjoro Jesuo, sanktan Johanon. Li tujmomente klarigos al ci, ke ci ne povas esti akceptita en la ĉielon.

— Diru al mi, frato, kion bonan ci estas farinta por sinjoro Jesuo dum cia surtera vivo, ke nun ci deziras trafi ĉielen ?

— Kion bonan mi faris, ci demandas, sankta apostolo ? Mi bone paŝtis la brutetojn ; ĉiujn homojn, birdetojn, arbaretojn, la suneton, verdajn herbejetojn mi amis kaj

amante mi gloris Dion, ke estas tiel bele kaj bone vivi en la mondo.

— Tio malmulte estas, frato, por trafi en la ĉielon. Ci devis, kiel mi, suferi por Lia sankta nomo.

— Kiel mi povis suferi, sankta apostolo, por Lia sankta nomo, se neniurmentis min. Mi amis ĉiujn, al neniur mi faris malbonon, ankaŭ al mi neniur faris malbonon. Oni priridadis min iam, eĉ mokadis iu, kiam mi gajigis la homojn, tamen mi ne ofendiĝis.

— Ni scias, ke ci maldecajn kantaĉojn kantadis, ridigis homojn, krom tio, drinkadis. Ĉio ĉi ne estas bona, kaj tial ci devas pentofari en la purgatorio.

— Kial tio ne estas bona, sankta apostolo, se mi ĉion ĉi faris pro la amo. Al mi estis bone kaj gaje, mi deziris, ke ankaŭ al aliaj estu bone kaj gaje, tial mi ĝojigis la homojn, kiel mi scipovis. Ja ci mem, sankta apostolo, ordonis ĉiujn ami, do nun pro tio, ke mi obeis cin, ci min riproĉas, ne enlasas min en la ĉielon kaj ankoraŭ ordonas en la purgatorio suferi. Ĉu tio estas justa ?

Ekpensis sankta Johano, aŭdinte tiujn vortojn, kaj diras al sankta Petro :

— Oni devos malfermi la pordegon. Li iru en la ĉielon !

— Se ci, sankta Johano, ĉi tiel opinias, eble endas enlasi lin. Tut-

egale, ni ne forkroĉigos lin de ni.

Sankta Petro malfermis la ĉielpordegon, enlasis Gugis'on kaj jam estis denove fermenta ĝin.

— Atendu, sankta Petro — haltigis lin Gugis, — tie antaŭ la pordego staras mia najbaro, endas enlasi ankaŭ lin. Kie li, mizerulo tiel timoplena, sola trovos por si lokon.

— Ne, lin mi ne povas lasi en la ĉielon. Al mi estas ordonite, ke mi ne malfermu al li la pordegon.

— Pro kio, sankta petro? Ja li estas virta homo, de ĉiuj estimata li estis — kaj tamen ci ne volas enlasi lin en la ĉielon.

— Ci vidas, vivante sur la tero li fieris pro sia pieco, ĉiujn malŝatis kaj insultis pro sia fiero. Alfine, ĉu li ĉi tie ne malŝatis cin, ĉu li ne akuzis cin antaŭ mi?

— Mi pro tio ne koleras kontraŭ li, kial do ci devas koleri? Mi pardonis al li, ĉar li ne estas kulpa, ke Dio donis al li tian karakteron.

— Li iru en la purgatorion kaj forpurigu de sis fiereco. Tiam mi lasos lin en la ĉielon.

— He, sankta Petro! Lia fiereco restis sur la tero. Se ci estus vidinta, kiel li, irante kun mi, tremis pro timo ci ne dirus, ke li devas forpurigi pro siaj fieroj.

— Li purigu, pentofaru pro sia fiereco, kiun li elmontris estante surtere.

— Vantaĵojn ci parolas, sankta Petro! Kie estas la fiero de tiu ĉi homo, kiu ĉiun timas? Lasu lin en la ĉielon, ne aliel! Tutegale mi ne permesos al ci fermi la pordegon, ĝis ci enlasis lin. Cerbumu ci mem, ĉu mi povas forlasi mian vojiran amikon, restigi la homon sola, eĉ tian, kiu ĉion timas. Jam nur pro tiaĵo mi meritis, ke oni min ree forpelu el la ĉielo. Ankoraŭ, kiel mi povos ĝoĝi pri la ĉielfeliĉo, sciante, ke ĉi homo, pli bona ol mi, turmentigas en la purgatorio.

— Kion mi povas, foje estas ordonite al mi ne enlasi lin.

— Tio estas ordonita al ci, sed ne al mi, sankta Petro. Tial mi povas. Kiam mi estis sur la tero, ĉiuj estis mastroj super mi. Estu ankaŭ mi mastro almenaŭ por mallonga tempo!

Tion dirinte li ekkuris al Kukis, kaptis lin ĉe la mano kaj entrenis lin en la ĉielon kaj malfermis la ĉielpordegon.

Sankta Petro ekbalancis la kapon, gratis la verton, rigardis al sankta Johano kaj, vidante, ke tiu silentas, fermŝlosis la pordegon, murmurante al si mem subnaze:

— Unuan fojon mi vidas tian obstinan homon, kiu ne obeas eĉ al decidoj de Dio.

Esperantigis *Kl. Naudzius*

Al triumfanta mond-koncepto

(Diadalmaŝ világ-nézet-hez)

Laodoro de freŝe falçita herbaro penetris çies pulmon kvankam ĝi estis sufiçe bone traerumita dum la kelktaga restado kaj marŝado en pura, arbara aero monta.

Vidám paŝadas en la unua linio kune kun Ŭde kaj Bátor.

— Jen la geedziĝo, li diras malice, montrante al ŝnureto, sur kiu pendas subvestaĵoj: virina, vira kaj infana. Poste li ekkrias:

Ha-lo, ha-lo! Kie la mastro?

Mezaĝa viro malalta ekaperas.

— Çion bonan! Sinjoro mastro!

— Bonan vesperon, sinjoro Vidám! Çu vi estas? Bonvenon al çiu!

Lia blanka çemizo ankoraŭ lumis en la krepusko, sed la vizaĝo jam stompiĝis kaj la griza pantalono perdiĝis en la naskiĝanta mallumo.

Sed, kie estas sinjoro Çalán? Çu li ne venis?

— Ne, li ne plu venos!

— Eble, çu ne?

— Jes, li forpasis. . .

— Ne diru! Kiam?

— Pasintjare en la arbaro de Ŝomkut. Subite. Ni rakontos tion,

sed nun bonvolu helpi al liaj homoj kvazaŭ li mem estus çi tie.

— Povra oldulo, li diras al si mem kaj daŭrigas pli forte: la virinoj dormos en la domo kaj la viroj en la fojnejo. Çu vi estas çiuŝ sanaj?

— Jes, nur unu estas iom vundita, Adattanoŝ. Vi ja konas lin. Sed ankaŭ li povas dormi kun ni.

— Kias? Kio estas al li?

— Li asertas, ke vipuro lin mordis, sed reale io alia lin pinçis. Çi povas esti: abelo, vespo, arbara muŝo, burdo. . .

En la subtegmento oni sternis tendotolon sur la fojnon. Çiu rapidis pretigi la kuŝejon, çar la laceco estis malagrable, eç pri manĝo oni rezignis.

Ankaŭ Adattanoŝ estas preta kaj kuŝiĝas. Post kelka minuto, li suflo-ras al Vidám, kiu kuŝas apud li, ke io moviĝas sub la tendotolo. Vidám duondorme respondas: lasu min, mi jam preskaŭ dormas. . .

Adattanoŝ same estas dormema, sed io ekmoviĝas nove, ĝuste sub lia kapo. Vipuro, li pensas kaj denove turnas sin al Vidám. Vane, tiu ne

respondas, dormas. Dume ĉio silentiĝas sub la kovrilo kaj li remetas la kapon por ekdormi. Lia kapo peziĝas . . . sed la ekdormo sekundon malfruis. Li denove aŭdas, ke io movas sin sub la tendotolo. Vipuro, tio estas jam certa. Li volas tion komuniki al la najbaro, al Vágó, kiu same dormas. — Kiu ne dormas? li demandas duonforte en la mallumo. Neniu respondas, ĉiu ritme spiradas. Tiel peza estas lia kapo, ke li ne povas teni ĝin en la aero, ĝi falas. La vipuro mordos nin ĉiujn ĝis morgaŭ, li pensas. Mi devus veki ĉiujn kaj fari lumon por eligi ĝin, sed la refalinta kapo jam ne funkcias plu konscie. . .

Matene, sub la gvido de Vágó, la du amikoj Šerénj kaj Sorgoš kune agadas ĉirkaŭ la libera fajro, super kiu pendas du kaldronoj. Unu estas plena kun akvo, la alia nur ĝis la mezo.

Ankaŭ Ŭde aĝetas kaj kelkaj aliaj, kiuj jam lavis sin en la rivereto. Oni kuiras ovon kaj teon. La akvo jam boletas kaj Ŭde metas la ovojn en ĝin. En la nigra kaldrono blankas la ovonesto. Ŝajnas, ke ĝi estas eĉ pli blanka en la perlanta akvo. . .

Kokidoj ne elkoviĝas el ĉi nesto. La vivon en la ovo tratanĉas la varmego. Ĉi ovoĵ havos nur la duan rolon : per metabolismo ili kontri-

buos al la subteno de jam ekzistanta vivo. La natura estiĝo de nova vivo el la senviva sur la tero ĉesis. . .

Kial ne estiĝas vivo nuntempe el la neorganika?

Ĉu io tranĉas la eblecon, kiel la varmego tion faras en la ovoĵ aŭ certaj kondiĉoj forpasis, kiel ĉe la virino super 45 jaroĵ?

Kial ne reviviĝas la mortintoĵ?

Jen la vaporo abunde leviĝas el la kaldronoj. . . El akvo iĝas vaporo, el vivanta homo mortinto. . . Sed el vaporo denove estos akvo. Kial ne el polvo de mortinto ree vivanta homo? Ĉu la kondiĉo por la unua forpasis kaj tiu por la lasta ankoraŭ ne alvenis, ne kreiĝis?

Mi ne scias, ne scias. . . sed ni devas ekscii!

Jene pensadis Ŭde pri la estiĝo de la vivo kaj pri la reviviĝo, la du favorataĵ temoj de Ĉalán.

La alveninta Vidám dum iom da tempo rigardas la knabinon, sed poste ekdemandas ŝin :

— Pri kio vi pensadas?

Ŝi en kelkaj vortoj ripetas sian pens-iradon, kun kiu ankaŭ li konsentas. Ekrigardinte ree la pendantajn tolaĵojn sur la ŝnureto li daŭrigas :

— Ankaŭ la subvestaĵoj atestas pri rondiro. Ĉiun 2-3an semajnon oni faras grandan lavadon. Poste la puran tolaĵon oni malpurigas kaj

denove sekvas la lavado, gladado, kaj ĉio ripetigas ree kaj ree. Ĉalan nepre pravas, kiam li asertas, ke ĉio cirkulas : jen ankaŭ la tolaĵo!

— Pro tio mi demandas : ĉu nur la konscio estus escepto? Ĉu ĝi sola ne partoprenus la rondiron?

Ankaŭ Bátor alvenis kaj aŭdis la lastajn vortojn. Kun matena impeto li intervenis :

— Mi jam plurfoje diris, ke la konscio estas ligita de korpo.

— Tiam mia korpo-restaĵon oni disŝutu sur la surfacon de la tero kaj oni semu en ĝin herbograjnojn. La herbon oni manĝigu al bovino, la lakton donu al la infano, por ke kiel eble plej baldaŭ revenu kun la korpo ankaŭ la konscio. Manĝu min la bovino! gaje diris Vidám.

Oni povas elimini la bovinon, se vi tiel rapidas, replikis Bátor. Eĉ pli kurte oni povas procedi. Metu tomaton, kukumon, salaton, kiujn la homo povas konsumi rekte sen bovino, sen kuirado. Ĉu vi volas transformiĝi je ili anstataŭ herbo-lakto?

Vidám ĉirkaŭrigardas kaj vidas, ke la virinoj : la edzino de Titok, Iró kaj ankaŭ Vidámin, lia edzino jam trinkadas la teon, dume li eĉ la ovon ne manĝis. Li transprenas nun la unuan ovon el la mano de Ŭde kaj diras :

— Bone, ke la infanoj ne estas tie ĉi, el la virinoj nur Ŭde estas

senedza, sed ŝi estas medicinisto, do mi povas permesi al mi paroli pli libere. Mi ne respondas pri la propono de Bátor, sed donas alian ekzemplon por la cirkulo de la materialo.

— Sinjorinoj, ĉu estas bona la teo? Ĉu ĝi estas bongusta? Ĉu ĝi glitas agrable tra la gorgo? Se jes, tiam memoru pri tio, ke ni jam elpisis foje la akvon, el kiu ni kuiris la teon kaj ĝi nun tuŝas viajn lipojn, buŝon kaj gorgon. . .

— Ve, kion vi parolas. Kiel vi povas tian elpensi?

Li ŝatis konsterni la virinojn kaj se tio sukcesis, tiam larĝiĝis lia buŝo, rondiĝis la vizaĝo, bonguste li ridis. Eĉ la okuloj fermiĝis kaj foje oni povis observi komencan skuiĝon ĉe lia ventro kreskanta. Li ruze daŭrigas la paroladon por trankviligi la virinojn.

— Pardonu, mi petas! Mi povas fabeli pli belan.

Vivis iam knabinoj, belaj, de deksep jaroj, laŭnombre kvincent. Ili vivis dise en la lando. La gepatroj rigardis ilin atende, kiel la burĝonoj ekfloreto kaj la fianĉoj atendis la momenton, kiam ili malfermiĝos, kiam estos pretaj por la nupto. Sed la soldatoj de la turka imperio kun-kolektis ilin zorge kaj transportis al haremo de la sultano, kiu fendis burĝonon post burĝono. Poste li donis

ilin al siaj fidelaj subuloj, kiuj enu-
inte ilin faris simile, kiel la sultano
mem. Dum jaroj la petaloj falis kaj
la knabinoj mem falis post la petal-
ojn ĉiam pli kaj pli malsupren. Ĉiu
tordis iom el ili ĝis la ĉifitaj virinoj
malmultiĝis. Fine en urboj Gaza kaj
Kairo el maljunaj sklavinoj nekonataj
elglutas la lastaj gutoj de la lasta
menstruo, el kiuj gutoj boliĝis la
hodiaŭa teo. . .

— Ho, hontu vi! Ni ne plu
parolos kun vi! krietis la virinoj
ĉirkaŭ la fajro. Precipe lia edzino
tre serioze ekkoleris. . .

— Helpon! H-e-l-p-o-n! Vipuro!
Vipuroj! Sibilis tra la aero la ektimo
de iu vira voĉo. La krion sekvis brua
falego.

— Kias? Kio okazas? demandas
ĉiu.

— Jen Adattanoŝ! Montras iu el
la grupo al la stalo. Li elsaltis el la
fojna subtegmento.

— Tie la ligna ŝtupetaro tamen
saltis. . . Kial? demandadis ĉiu
konfuze.

Vidám fulme suriĝas la ŝtupeta-
ron. Adattanoŝ postkrietas,

— Atentu! Du vipuroj!

Vidám ekvidis ilin. Vere, ili
estis, inter la tegoloj kaj la lato,
kuntordiĝintaj kaj klopodis fali mal-
supren sur la fojnon aŭ sur la kapon
de tiu, kiu hazarde sube restadas.
Adattanoŝ ĝuste volis levi la dorso-
sakon de sub la tegolo, kiam je brueto
li suprenokulis. Kiam li observis ilin
super la kapo, tuj falis la sako el liaj
manoj kaj li mem tra la truo de la
tegmento sur la korton.

Post la granda ektimo, Vidám
jetis la vipurojn per bastono sur la
teron. Tie oni konstatis, ke ili estas
apudakvaj kolubroj aŭ tropidonotoj,
kiuj estas tute sendanĝeraj al homoj.

(*Daŭrigota*)

STAFETO-LIBROJ

Miyamoto Masao: **Invit' al japanesko.**

— Originala poemaro. — Antaŭparolo de William Auld. — Postparole: 1. *Ek-
splike* de Ueyama Masao; 2. *Eldonista noto* de Juan Régulo. — Kovrilo de Jan
Schaap Jr. — STAFETO: Beletraĵ Kajeroj, 42. — J. Régulo, Eldonisto, La Laguna,
Tenerifo, 1971 (1972). — 12×18.5cm. — 111 pĝ. — Prezo: 2 usonaj dolaroj (aŭ
egalvaloro) plus 10% por sendkostoj.

Federico Garcia Lorca: **Cigana romancaro.**

— El la hispana tradukis Fernando de Diego. — Antaŭparolo de William Auld.
— Enkonduko de Fernand de Diego. — Kovrilo de Jan Schaap Jr. — STAFETO: Bele-
traĵ Kajeroj, 43. — J. Régulo, Eldonisto, La Laguna, Tenerifo, 1971 (1972). 12×18.5
cm. — 111 pĝ. — Prezo: 2 usonaj dolaroj (aŭ egalvaloro) plus 10% por sendkostoj.

Abonkotizo de Oomoto

Laŭlanda tarifo por 1 jaro

Lando kaj kotizo :

Bv. pagi al :

Argentino egalvaloro de 24 steloj (6.00 n.gld.)	S-ro Mariano Calvo, El Rastreador, 679 Barrio Liniers, Buenos Aires 8a
Aŭstrujo 50 ŝil.	D-ro Adolf Halbedl, Schmittstrasse 17, A-8720 Knittelfeld Konto : n-ro 37. 330 ĉe Österr. Postsparkasse Wien
Aŭstralio 1.60 aŭs. dol.	S-ro F.R. Banham, 31 St. Andrew's Avenue, Rosanna, Victoria 3084
Brazilo egalvaloro de 24 steloj (6.00 n.gld.)	Prof. Benedicto Silva, Cx. R. 17,96 Monte Aprazivel, SP
Britujo 70 pencoj	D-ro A. Mildwulf, 71 Compayne-Gardens, London N.W.6
Bulgarujo egalvaloro de 24 steloj (6.00 n.gld.)	S-ro Atanas Nikolov, Str. Alabin, 30-Esperanto, Sofia
Ĉeĥoslovakio egalvaloro de 24 steloj (6.00 n.gld.)	S-ino Cichová Jana, Praha 9, u Svobodarny 12
Danlando 12 d.kr.	S-ro Ib Schleicher, Ved Bellahøj 21. 13-Kopenhago BRH
Finnlando 6.00 f.mk.	S-ro Jussi Jäntti, ESPERANTO, PL 7 SF-70101 Kuopio 10, (pĝk : KU 8344-1)
Francujo 8.40 F.	S-ino Renée Volpelière, Ul. 2018, 10 rue de la Servie, 30-Nimes (Gard) — Poŝtĉekkonto : Montpellier 1070-06
Germanujo 7 g.mk.	S-ro F. Moravec, 239, Flensburg-Murwik, Fördestr.15. Poŝtĉekkonto : Hamburg 683 19
(DDR) egalvaloro de 24 steloj (6.00 n.gld)	S-ro Albert Klemm, Schwarzburger Strasse 5, Bad Blankenburg(Thur, Wald)
Grekujo 48 dr.	S-ro K.Zahariadis, Petrompei 4, T. T. 507, Thessaloniki
Hindujo 7.2 rp.	S-ro R. B. Joshi, K. L. Arts and Commerce College, Bag- bahara (Dist. Raipur), M. P. State. Hindujo-India
Hungarujo egalvaloro de 24 steloj (6.00 n.gld.)	S-ino Luisa Brichta, Budapest V, Bathory u. 19
Italujo 1,080 liloj	Itala Esperanto-Federacio, a/c Maria Frus, Via Po No 7, Torino
Israelo egalvaloro de 24 steloj (6.00 n.gld)	S-ro Ben-Alter Jehiel, Ta Doar 379, Petah-Tikva
Jugoslavio 1,350 din.	Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto Matije Gupca 27, ZEMUN.
Kanado 1.70 dol.	S-ro Gastao Florencio, 3537 Park Avenue, Montreal, I 30-P. Q.
Pollando egalvaloro de 24 steloj (6.00 n.gld.)	S-ro Edmund Sidorowicz, Warszawa, Swierczewskiego 82-a, m. 22,
Portugalujo 48 esk.	S-ro J. Antunes, Av. Uruguai, 21, 5ª Dtª, Lisboa-4
Usono 1.70 dol.	S-ino William H. Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, Calif, 94010.

En landoj, kies nomo ne troviĝas en la supra listo, oni sendu abonkotizon (egalan al 6.00 n.gld.) al : **Universala Esperanto-Asocio**, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando, aŭ rekte al : **Oomoto**, Kameoka, Kioto-hu, 621 Japanujo.